# Esperanto - La Bitbulteno 97

esperanto.es

## LLEGA NUESTRA GRAN FIESTA

Como es tradicional, el próximo 15 de diciembre se celebra el Día de Zamenhof, o Día de la Cultura en Esperanto, originalmente celebrado como Día del Libro. Numerosos grupos, organizados o no, celebrarán el día con actividades culturales o con comidas de confraternización. Algunos de ellos, en España o en otros países, los puedes ver en la web EventaServo, patrocinada por la Asociación Universal de Esperanto: https://zamenhof.eventaservo.org.

Entre las iniciativas internacionales hay que destacar este año que la famosa estatua de Cristo Salvador en Río de Janeiro será iluminada en color verde el día 15 desde las 8 de la tarde (hora local). Otros tres monumentos de la ciudad también brillarán en color verde. El color simboliza la esperanza, especialmente la esperanza de los esperantistas en una mejor comprensión internacional gracias al esperanto.

En España también puedes contactar con tu club local o asociación regional, para conocer sus planes, o juntarte con otros esperantistas cercanos para organizar una actividad común. Publica tus fotos en las redes sociales, o envíanoslas a

letero@esperanto.es

, para darlas a a conocer.

Y si quieres adquirir algún libro, para seguir la tradición, recuerda que la Federación dispone de un servicio de venta donde puedes encargar libros de aprendizaje, literatura original, traducciones (incluido el Quijote con una nueva "camisa"), ensayos, etc.




## NUEVA INFORMACIÓN SOBRE EL CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO 2025

La web del Congreso Español de Esperanto 2025, que tendrá lugar en Soria, del 1 al 4 de mayo, ya dispone de la información más práctica: sede, transporte, alojamiento, excursiones, banquete conjunto, etc. Aquí puedes encontrar la información básica.

También podemos confirmar ya varios elementos del programa. Por ejemplo, podrás disfrutar de una velada literaria, aprovechando la relación de Soria con la poesía, ya sea como fuente de inspiración o por el origen de varios poetas importantes. Podremos disfrutar de música en directo, abierta también a los vecinos de Soria, con conciertos de JoMo y Kaj Tiel Plu. Por supuesto, no faltarán conferencias, entretenimiento, cursos, etc. Consulta los primeros detalles en: https://kongreso.esperanto.es/el-programa/.

Respecto a las visitas turísticas, contaremos con rutas guiadas por la propia Soria, y también al yacimiento arqueológico de Numancia. Habrá un post-congreso el día 5, que llevará a los interesados a ciudades importantes de la provincia de Soria (El Burgo de Osma, Gormaz, Calatañazor).

Toda la información, incluido el formulario de inscripción, se puede encontrar en: https://kongreso.esperanto.es/.

Recuerda que hasta fin de mes disfrutarás de una cuota de inscripción favorable, ¡así que aprovecha el momento! Ten en cuenta también que debido al atractivo de este puente vacacional, vale la pena reservar el transporte y el alojamiento lo antes posible.




**AMPLIADO EL PLAZO PARA EL CONGRESO UNIVERSAL DE ESPERANTO**

La Asociación Universal de Esperanto ha anunciado una modificación en las fechas del Congreso Internacional de Esperanto, que el próximo año tendrá lugar en la ciudad checa de Brno: será entre el 26 de julio y el 2 de agosto del 2025. Por esta razón, se ha ampliado el primer plazo de inscripción, con cuota reducida, hasta el 15 de diciembre próximo. Date prisa para apuntarte.

Como consecuencia, se han modificado también las fechas del Congreso Juvenil Internacional, que tendrá lugar en Indonesia, concretamente en Cisarua (Bogor), del 9 al 16-a de agosto. Más informaciones en: ijk2025.tejo.org.




**ANIVERSARIO DE LA RESOLUCIÓN DE UNESCO**

El 10 de diciembre se celebró el 70º aniversario de la resolución de la UNESCO que reconocía los valores del esperanto, aprobada en la Conferencia Internacional que tuvo lugar en Montevideo en 1954.
Con tal ocasión se celebró en el Parlamento uruguayo un acto oficial, donde se enfatizó la vigencia de los valores del esperanto, y la colaboración de los esperantistas con esa organización internacional y el entorno de las Naciones Unidas. Puedes leer un reportaje en esta crónica.

Hay que recordar que entre tal colaboración se puede enfatizar la traducción de "El Correo de la UNESCO" al esperanto, que se puede encontrar aquí (enlace desde la web de UEA).

Con tal ocasión la Federación Española de Esperanto envió un comunicado de prensa, que puedes leer por ejemplo en Tercera Información. También con esa ocasión Toño del Barrio fue entrevistado en Onda Vasca el mismo día 10.



## CHARLA EN HUESCA

El pasado 24 de octubre tuvo lugar una charla sobre el esperanto ("Esperanto, la lengua de la paz") en un centro cultural de Huesca, organizada por "Frateco" y "Liberanimo", las dos asociaciones esperantistas aragonesas. Intervinieron los dos presidentes de las asociaciones, respectivamente Lorenzo Noguero y Alberto Granados.

Asistieron una treintena de personas, muy interesadas en la lengua internacional.

## PUBLICADO UN LIBRO DE VICENTE RISCO EN ESPERANTO

Justo a tiempo para celebrar el Día del Libro en Esperanto este 15 de diciembre, la Fundación Vicente Risco de Allariz (Ourense) ha editado "Galegio estas mondo", la traducción al esperanto de una colección de aforismos de este autor.

Vicente Risco (1885.1963) fue un reconocido intelectual gallego, uno de los padres intelectuales del nacionalismo gallego, en su vertiente más tradicionalista. Tuvo mucha relación con los esperantistas locales, y un ejemplar del Fundamento de Esperanto se conserva en su biblioteca personal, que gestiona la citada Fundación.

El libro ha sido traducido por Alejandro Pareja, y la edición ha contado con el apoyo de la Fundación Esperanto, que dispone de ejemplares para las personas interesadas.



## CAMPAÑA DE AFILIACIÓN A LA FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Se ha abierto ya la campaña de afiliación a la Federación Española de Esperanto. Puedes encontrar el boletín de afiliación en la dirección http://www.esperanto.es/inscripcion (también en pdf y en doc). De esta manera puedes apoyar a la lengua internacional y colaborar en nuestras actividades.

También recordamos la posibilidad (si tus circunstancias lo permiten) de donar a la Federación o la Fundación Esperanto, lo que además presenta grandes ventajas fiscales. ¡Aprovecha antes de que termine el año!

**ALVENAS LA ZAMENHOF-TAGO!**

Kiel tradicie, la venontan 15-an de decembro estas la Zamenhofa Tago, aŭ Tago de la Libro en Esperanto. Multaj grupoj, organizitaj aŭ ne, festos la datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof per kulturaj agadoj aŭ kun frataj bankedoj. Kelkaj el ili, en Hispanio aŭ aliaj landoj, estas listigitaj en la retejo EventaServo, sponsorita de Universala Esperanto-Asocio: https://zamenhof.eventaservo.org.


Inter la internaciaj iniciatoj, indas mencii ke ĉi-jare la mondfama Kristo-statuo en Rio-de-Ĵanejro brilos en verda lumo, vespere ekde la 8a horo (loka tempo). Tri aliaj monumentoj de la urbo ankaŭ estos lumigataj verde. La koloro simbolas esperon, precipe la esperon de Esperanto-parolantoj por pli bona internacia kompreno per Esperanto.

En Hispanio vi povas ankaŭ kontakti vian lokan klubon aŭ regionan asocion por koni iliajn planojn, aŭ kunveni kun aliaj proksimaj esperantistoj por organizi komunan agadon. Publikigu viajn fotojn en sociaj retoj, aŭ sendu ilin al

letero@esperanto.es

, por konigi ilin.

Kaj se vi volas aĉeti libron, por daŭrigi la tradicion, memoru, ke la Federacio disponas je libroservo, kie vi povas mendi lernolibrojn, originalajn literaturojn, tradukojn (inkluzive de Don Quijote, nun kun nova "jaketo"), eseojn ktp.




## PUBLIKIGITAJ NOVAJ INFORMOJ PRI LA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO DE 2025

La retejo de la Hispana Esperanto-Kongreso 2025, kiu okazos en Sorio, de la 1a ĝis la 4a de majo, jam disponas je plej praktikaj informoj: sidejo, transporto, gastigado, ekskursoj, komuna bankedo, ktp. Jen la bazaj informoj.

Ni ankaŭ povas jam konfirmi plurajn erojn el la programo. Ekzemple, vi povos ĝui je literatura vespero, profitante la rilaton de Sorio al la poezio, ĉu kiel inspirfonto, ĉu pro la deveno de pluraj gravaj poetoj. Ne mankos muziko, kun koncertoj de JoMo kaj Kaj Tiel Plu. Kompreneble, ankaŭ ne mankos prelegoj, distraĵoj, kursoj, k.s. Vidu la unuajn detalojn ĉe: https://kongreso.esperanto.es/la-programo/.

Pri turismaj vizitoj, ni havos gviditajn itinerojn en Sorio mem, kaj ankaŭ al la antaŭromia urbo Numantio. La lundon 5an de majo, postkongreso gvidos interesiĝantojn al gravaj urboj en la provinco Sorio (El Burgo de Osma, Gormaz, Calatañazor).

Ĉiujn informojn, inklude de aliĝilo, trovu ĉe: https://kongreso.esperanto.es/

Memoru ke ĝis la fino de monato vi ĝuos favoran aliĝkotizon, do profitu la momenton! Notu ankaŭ ke pro la altiro de tiu feriponto, indas rezervi transporton kaj loĝadon kiom eble plej frue.



## PLILONGIGITA LA LIMDATO POR LA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Universala Esperanto-Asocio anoncis ŝanĝon de la datoj de la Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos venontjare en la ĉeĥa urbo Brno: ĝi disvolviĝos inter la 26-a de julio kaj la 2-a de aŭgusto 2025. Pro tio, estis plilongigita la unua aliĝperiodo, kun reduktita kotizo, ĝis la 15-a de decembro. Rapidu aliĝi.

Sekve estis ankaŭ modifitaj la datoj de la Internacia Junulara Kongreso, kiu okazos en Indonezio, specife en Cisarua (Bogor), de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto. Pliaj informoj ĉe: ijk2025.tejo.org.




## DATREVENO DE LA REZOLUCIO DE UNESKO

La 10-an de decembro estis la 70-a datreveno de la rezolucio de Unesko rekonanta la valorojn de Esperanto, aprobita en la Internacia Konferenco, kiu okazis en Montevideo en 1954. Por tion kunmemori okazis oficiala evento en la Parlamento de Urugvajo, kie oni emfazis la validecon de la valoroj de Esperanto, kaj la kunlaboron de esperantistoj kun tiu internacia organizo kaj la medio de Unuiĝintaj Nacioj. Vi povas legi raporton (hispanlingvan) en ĉi tiu kroniko.

Indas memori, ke inter tia kunlaboro ni povas emfazi la tradukon de "La Kuriero de Unesko" al Esperanto, kies lastaj numeroj troviĝas ĉi tie (ligilo el la retejo de UEA).

Profitante la okazon, Hispana Esperanto-Federacio sendis gazetaran komunikon, kiun vi povas legi ekzemple en retgazeto Tercera Información. Ankaŭ rilate al tiu okazo Toño del Barrio estis intervjuita ĉe Onda Vasca en tiu sama tago.



## PRELEGO EN HUESCA

La pasintan 24an de oktobro okazis parolado pri Esperanto ("Esperanto, la lingvo de la paco") en Osko (Huesca), organizita kune de "Frateco" kaj "Liberanimo", la du aragonaj esperanto-societoj. Parolis Lorenzo Noguero kaj Alberto Granados, ties respektivaj prezidantoj.

Alvenis ĉirkaŭ tridek homoj, tre interesitaj pri la Internacia Lingvo.



## PUBLIKIGITA LIBRO DE VICENTE RISCO EN ESPERANTO

Ĝustatempe por festi la Esperantan Librotagon ĉi tiun 15-an de decembro, la Fondaĵo Vicente Risco de Allariz (provinco Oŭrenso) eldonis "Galegio estas mondo", la Esperantan tradukon de kolekto de aforismoj de ĉi tiu aŭtoro.

Vicente Risco (1885-1963) estis fama galega intelektulo, unu el la intelektaj patroj de la galega naciismo, en ties plej tradiciisma tendenco. Li havis proksiman rilaton kun la lokaj esperantistoj, kaj ekzemplero de la Fundamento de Esperanto estas konservata en lia persona biblioteko, kiu estas administrata de la menciita Fondaĵo.

La libron tradukis Alejandro Pareja, kaj la eldono havas la subtenon de Fondaĵo Esperanto, kiu disponas je ekzempleroj por interesiĝantoj.




## ALIĜKAMPANJO AL HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Malfermiĝis la kampanjo por fariĝi ano de Hispana Esperanto-Federacio por la jaro 2025.

Trovu la formularon por enskribiĝo ĉe la adreso http://www.esperanto.es/inscripcion (ankaŭ en pdf aŭ en doc-formato). Tiel vi povas kontribui al la disvastigo de Esperanto kaj profiti la avantaĝojn esti membro, interalie por reduktita kotizo al la Hispana Kongreso de Sorio.

Ni ankaŭ memorigas la eblecon (kaj dezirindecon, se viaj cirkonstancoj tion ebligas) donaci al la Federacio aŭ al Fundación Esperanto, por faciligi la publikajn agadojn resp. helpojn de ambaŭ asocioj, kio krome havigas grandajn fiskajn avantaĝojn. Profitu antaŭ la fino de la jaro!

Fundación Esperanto